b) *Nepre regule*: nur esceptokaze oni rezignu kunvenon, kvankam ĉiuj konsentas ke dum la somera libertempo ili tute ne okazu: forvojaĝoj, vizitoj, la longaj lumaj vesperoj rezultigas malpli regulan ĉeston, eĉ de la plej fervoraj anoj.

c) Dum la kunvenoj, la lingvo estu nepre Esperanto. Tro ofte ili okazas por, pro E-o, ne en E-o. Tamen, ĉi tio ĉefas. Kelkaj moka ŝultrolevas: «Kial samlingvanoj interparolu esperante?» Nu, kiel ni iam kapablos konversacii kun alilingvanoj, se ni neniam provas la aferon inter ni? Ja, ĉiuj konsentas ke la parola esprimado konsistigas la plej malfacilan flankon de ĉi ajn lingvo, ankaŭ de E-o. Ne protestu ke la membroj ne komprenos vin; vi nur parolu klare, malrapide, kaj konstruu simplajn frazojn per simplaj vortoj. Ne protestu ke la anoj ne kapablos respondi. Komprenible, komence ili spertos malfacilaĵojn. Sed ili tro facile, senpripense respondas: «Mi ne scias», por eskapi. Vi ne cedu. Komence vi helpu, vi kuragigu ilin, ĉar prosperante vi konscias ke «Ĉiu komenco estas malfacila». Baldaŭ la membroj kutimiĝos kaj fakte plej profitos el via necedemo.

La programoj de la kunvenoj.

Multaj libretoj kaj broŝuroj, i.a. «La Esperanto-Klubo» de Malmgren kaj

«Kiel arangi kursojn kaj grupvesperojn?» de Wingen sufiĉe detale pritraktas ĉi tiun aferon kaj donas bonegajn konsilojn. Kelkajn sugestojn mi ŝatus tuŝi. Ni ne imagu ke eblas starigi programon validan por ĉiuj sekcioj kaj por ĉiuj kunvenoj ĝiaj. Tio estus senenca. Sed en ĉiu kunveno utilo kaj amuzo kunigu. Ĉiu kunveno kontentigu ĉiujn vizitantojn, ĉar la sekcioj ja ofte konsistas el anoj plej diversaj laŭ aĝo, profesio, preferoj, intelekta evoluo, ktp. Pro tio, ne estas konsilinde dediĉi tutan vesperon al unu sama unutona programo, kiel ajn interesa ĝi estu por kelkaj. Ni preferu varian programon. Sur ĝi figuru plej diversaj punktoj, ekz.: voĉlegado, paroladeto, mallonga diskuto, komunikoj, tradukoj, recenzoj, solvo de enigmoj, esperantaj ludoj, ktp., kaj nepre: lingva duonhoro kaj kantado. Ĉi-lasta komencu la kunvenojn. Tiel la belsona Esperanto ekŝvebas en la kunveno kaj favoras pluan uzon de la lingvo.

La lingva duonhoro estas speco de perfektiga kurseto. Ĝi nepre necesas, ĉar ni ne tro rapide imagu ke ni estas perfektaj esperantistoj. Tio ne signifas ke la lingva duonhoro ĉiam havu lecionan karakteron. Tute ne! Foje ĝi konsistu el korekto de erar-abunda teksto. Alifoje ĝi estos voĉlega transigo de teksto de unu verbotempo en alian, plenigo de nekompleta teksto pere de finaĵoj, aŭ de sufiĉaj aŭ de tutaj vortoj. Ankaŭ frazkonstruo per indikitaj vortoj estas bonega ekzerco. Ĉi lastaj ekzercoj povas okazi ankaŭ skribe. Ili forgesigas pri la leciona karaktero de la lingva duonhoro kaj tamen laborigas ĉiujn partoprenantojn. Ĝi povas ankaŭ havi konkurson (gramatikan, tradukan, redaktan), eĉ enigman karakteron. Kaj oni foje rekompencu la plej diligentajn.



LA VANA KANTO. — Lucien Thèvenin. — *originalaj versaĵoj-64-paĝa kartoneta, Bjr. 20, Eldono «Kompreni» Lyon. Mendebila ĉe F.E.I., Brussel.*

Birdo kaj poeto kantas laŭ sia beko. «La vana kanto» de la impresgema franco Thèvenin, natura kiel tiu de kampa birdo, plaĉos kiel la ŝajne sencela flugado de papilio eĉ al tiu, kiu... timas la Esperantopoezion.

Sane inspiris la poeton la naturo mem: sezonoj, ĉielo kaj vetero, akvo, astroj, nuboj, fumo kaj, krom figuro trafite fotografita, en tiu freŝa, trankvila atmosfero, la tradica amatino, kiun li ĉi-diras kiel ankaŭ sian violonon kaj la venton. Kompletigas la akcesoraĵojn de lia apenaŭ sentema, iom nostalgia poezio — ĉar nekontesteble estas, poezio kvankam ne ĉiam senmakuleta — sesdeko da birdoj, floroj, feraĵoj, arboj, fruktoj, bestoj, insektoj kaj ŝtonoj. Ĉi-okaze indus ekzameni ĉu tiaj, en Esperanto esence sciencaj terminoj, ĉiuj povas jam nunne poezie plenefiki... se la ordinara leganto ilin komprenas.

Pli severa kriterio por nia sufiĉe juna poezio ne malhelpas elekton el ĉi tiu lertforma kolekto, de pluraj perloj, ekz. la pli pasia «Matena Invito», kontraŭ kelkaj iom sentimentale anekdotaj versaĵoj, ŝajne el malnova tirkesto de la poeto, kiu honore festas sian kvardekan esperantistan jubileon.

Ni bedaŭre jam konkludu: ne serĉu ĉe li gravajn ideojn, emociigajn aŭ komplikajn sentojn sed distingigan, neinsisteman sincerecon, kolordeklitan pentron sur malgrandan «tukon», melodian, koncizan lingvon. La «Vana Kanto» do ne sonos vane en la koncerto de niaj bonaj poetoj.

Deca sed tro simpla eldono; eraroj maloftas; interpunkcio ofte mirigas.

TYN.

LA NEVENKEBLA GENO de Theo Thijssen. *El la nederlanda tradukis: F. Faulhaber. Eldonis: Libro-Servo de F.L.E. Amsterdam. Ilustrita, bindita, 320 paĝa. Mendebila F.E.I., Brussel, Prezo: fr. 84.*

Libro de famkonata nederlanda instruisto, naskita pedagogo kaj varma amiko de Esperanto. Aŭtoro de pluraj bonhumoraj verkoj li skizas en «La Nevenkebla Gen» (Momentoj de Tualeta Mizero) la ĝenon kiun spertas ĉiu kiu ne disponas sufiĉe planan monujon kaj tamen, ofte devige, devas vestiĝi, se ne elegante, almenaŭ dece laŭrange. En la libro tiu ĝeno persekutas la ĉefpersonon de la rakonto tra lia tuta vivo, ek de la lerneja tempo ĝis li iĝis emeritulo. Ĉiu el la 32 ĉapitroj estas memstaro rakonto, sed en ĉiu ni retrovas la

Ankaŭ la aliaj programpunktoj estu ĉiufoje plej variaj, eĉ la ludoj. Tia varia programo prezentas jenan avantaĝon: multaj kunlaboras por igi la vesperon agrabla, multaj ĝuas kaj profitas. Pro aktiva partopreno, la membroj sentas sin pli firme, pli intime ligitaj al la klubo, kaj la sekcio vivo viglas kaj prosperas.

De temp' al tempo ĉiuj membroj estu petataj individue aŭ kelkope prezenti ion dum festa kunveno. La kontribuo de unu estu sekreto por alia. Tiel la koncerna vespero estos unu granda surprizo, vera regalo. Sed mi konsilas ke almenaŭ unu persono (la ĉefo de la festkomitato ekz.) sciigu pri ĉiuj programeroj.

Specialaj aranĝoj.

La sperto instruas ke la malsameco de la grupanoj rilate aĝon, profesion, preferojn, intelektan evoluon, ktp. kelkfoje ĝenas la profitigan laboron de la kunveno. Pro tio, se la sekcio grandnombra, estas konsilinde dividi ĝin en grupojn. Ĉiu havas sian grupestron kaj aparte kunvenas por praktiki la lingvon laŭpove kaj plej fruktodone. Tamen, tiuj flankaj kluboj ne malutilu la sekcian vivon. La ĝeneralaj kunvenoj, kie ĉiuj renkontiĝas, restu la kerno. Ĉi-lastaj konsistu parte el kontribuoj de la sekcistraro (paroladoj, proponoj, sugestoj, komunikoj, ktp.) parte el programeroj prizorgotaj de ĉiu grupo (teatraĵeto, prezentata ŝarado, sorĉado, muziko, novaj kantoj, deklamado, ktp.) Flanke de ĉi tiuj specialaj ĝeneralaj kunvenoj povas okazi: letervesperoj, «Gaja vespero», ekskursoj, intimaj festoj (ekz. okaze de Kristnasko), partopreno al kongresoj, ktp., kiuj pli kaj pli intime interligas la sekcianojn kaj florigas la sekcian vivon.

(finota)

ĉefpersonon baraktanta kun la «nevenkebla ĝeno».

Unuaranga distra legaĵo en bona traduko, kontrolita de la Literatura Komitato F.L.E. La ampleksa libro estas tre plaĉe eldonita kaj ĉiurilate inda honorigo postmorta al varma amiko de Esperanto.

Eco.

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ 1947. *Kompilis H. Steiner, Direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. 130 p. Prezo: 13 int. respondkuponoj. Havebla ĉe: Hofrat H. Steiner, Wien I, Hofburg, Reichkanzlertrakt. Internacia Esperanto-Muzeo.*

Malgraŭ multaj malfacilaĵoj la Direktoro de I.E.M. en Vieno sukcesis eldoni la promesitan adresaron. Enestas proksimume 8.000 adresoj el 3.000 lokoj en 80 landoj. Nesufiĉa prilaborado sendube estas kaŭzo ke enestas sufiĉe multe da eraroj. Malgraŭ tio la libro certe estas tre utila por niaj korespondantoj, kolektantoj kaj vojaĝantoj.

Eco.

ESPERANTO IN TWINTIG LESSEN *door Hans Bakker. Geïllustreerd, 122 p. (+ 16 p. woordenlijst). Prijs: 52 fr. Sleutel: 8 fr. Verkrijgbaar bij het Vlaams Esperanto-Instituut.*

Aan dit leerboek van deze vooraanstaande esperantist zijn toegevoegd: een inleidende les, een woordenlijst en een Sleutel voor die zonder leermeester wenst te studeren. Het geheel is met tekeningen verlicht. Het eigenaardige van dit werk is, dat het bedoeld is als een schriftelijke cursus. De lessen zijn los van elkaar en bestaan uit 4 tot 8 pagina's. Het is echter gemakkelijk tot één geheel te vormen, door het van een stevige omslag te voorzien.

De auteur zegt in zijn Inleiding, o.i. zeer terecht: «De veelverbreide mening, dat men een taal goed kan leren zonder kennis van de grammatica, is fout». En: «De grammatica is het «reglement van orde» van een taal.» Daarom neemt hij als uitgangspunt de grammatica van de eigen taal. Maar... ook wij ondervonden het dikwijls, de kennis hiervan, zelfs bij zeer jonge mensen, is maar treurig! Welnu, in de inleidende les wordt het geheugen daaromtrent dagnig opgefriest! En ook in de lessen zelf, waar nodig.

Wij kunnen het warm aanbevelen aan kursussleiders. Ook is het, zeer geschikt voor zelfonderricht dank zij de «Sleutel» waarin de vertalingen, zowel Ned.-Esp. als Esp.-Ned. zijn samengevat.

A. LODEMA.

Het Lekenhoekje

Timotheus is mijn vriend en Timotheus is een beetje zwakzinnig.

Dit laatste beweren sommigen echter omdat Timotheus nog leeft zonder er rekening mee te houden, dat het mensdom reeds heel wat weg heeft afgelegd sinds zijn stamvader uit klei en aarde in het Paradijs werd geboetseerd. Timotheus leeft eenvoudig nog als de oermens, namelijk van de jacht en de visvangst: hij maakt voortdurend jacht op lichtgelovige, kapitaalkrachtige lui om ze vervolgens aan de haak te slaan en netjes te stropen. Simpeler kan het niet.

Maar daar onze huidige cultuurmaatschappij zo decadent is, dat ze geen patiente jacht op wild of kapitaal meer duldt, ligt Timotheus steeds jammerlijk overhoop met dezelfde maatschappij. De laatste confrontatie tussen haar en hem gebeurde in een zaaltje met vele gendarmes, deurwaarders, advocaten en één rechter. Het resultaat was, dat Timotheus als gevaarlijk voor de goede orde der twintigeeuwse cultuur (waarvan hij beweert, dat er meer «kul» dan «tuur» bij is) in een getraliede kooi werd gestopt voor een tijd, die gevaarlijk dicht de eeuwigheid benadert.

Toen ik de mare vernam scheelde het niets of ik was in tranen uitgebarsten. Ja, wat wil je er aandoen, ik houd van Timotheus. Ach, ik weet het wel: hij heeft een massa gebreken — hij heeft zelfs één bijzonder groot gebrek, waarover we 't straks nog zullen hebben! — maar welke sterveling heeft niet zijn gebreken?

Maandenlang leefde ik dus in zak en as, treurend om het bruuske «vertrek» van mijn geliefde vriend, tot er plots iets kwam, dat me er helemaal weer bovenop bracht, dat me bewees hoe een mens zelfs bloemen weet te vinden in een mestvaalt. Dit gebenedijde iets was een brief van Timotheus!

Hij schreef me hoe zijn laatste botsing met de maatschappij hem had leren inzien waarom zulk treffen steeds in zijn nadeel afliep: hij miste ondermeer de gave zich door de maatschappij te doen «begrijpen»! Maar thans had hij iets ontdekt waardoor het hem mogelijk zou worden — zo had hem ten minste een zeer geleerd medegevangene verzekerd — om door eenieder ter wereld, zelfs door gendarmes en rechters, «begrepen» te worden. Daartoe diende hij slechts een taal te leren, een verbluffend gemakkelijke taal die alle misverstanden tussen de mensen kon uitschakelen, een taal die de apostelen op Pinksterdag spraken: het Esperanto!

De simplistische opvatting van Timotheus (sommigen noemden hem toch een beetje zwakzinnig) in deze zaak verbijsterde me wel enigszins. Maar ik antwoorde hem even enthousiast en wensde hem veel succes bij z'n eenzame studie.

Twee jaar lang ontving ik regelmatig nieuws van Timotheus over z'n linguïstische vorderingen en telkens drukte hij daarbij de zoete hoop uit, dat er door zijn nieuwe kennis een hele ommekeer in zijn leven zou gebeuren.

Op zekere dag kreeg Timotheus voor de zoveelste maal clementie en stond plots vóór mij. Hij zag er een tikje schraal uit zoals altijd na een min of meer lange «zittijd». Doch er zat absoluut geen vuur meer in zijn wat uitpuillende, waterkleurige ogen en zijn bewegingen waren loom als van iemand, die eindelijk van alles en nog wat genoeg heeft.

Wij praatten en dronken zo'n beetje, net als vroeger bij dergelijke plechtigheden, maar toen Timotheus me niets nieuws scheen te vertellen te hebben, waagde ik het zelf maar de Esperanto-taart aan te snijden...

Timotheus haalde moedeloos de schouders op.

— Twee... twee jaar, grinsde hij, heb... heb... ik m'n tijd aan d... dit zaa... kje ver... verknoeld... Zwen... Zwendel... dit Es...esperanto, zwen... zwendel!... Wa... wat die stu... studie me ge... hol...holpen heeft, ku... kunt ge... ge wel zel... zelf... ho... ho... horen, ver... ver... verdraaid!

Ja, ik zei het toch al eerder: mijn vriend Timotheus heeft een massa gebreken, waaronder één heel grote. Hij stottert namelijk zo geweldig dat zelfs het Esperanto daaraan niets kon verhelpen.

Maar dit alles betekent toch niet, dat Timotheus een beetje zwakzinnig zou zijn, zoals sommige kwatongen durven beweren!...

PINOC

A/B TEDDY FABRIKEN. *Luksa katalogo-albumo eldonita de la A/B Teddy Fabriken en Malmö, Svedland.*

Tiu impona, multkolora ilustriita, trilingva (Sveda, Angla, Esperanta) katalogo prezentas la novajn kreaĵojn — porinfanaj ludiloj — fabrikatajn de la «Teddy» Fabrikoj en Malmö, precipe pupojn en nacia vesto, ursojn kaj aliajn bestojn en pluŝo, ktp.

La hela albumo atestas pri serioza uzo de Esperanto en internacia komercio. Komercestoj — kaj butikistoj — fakuloj petu la allogan reklamilon!

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen: Vanaf 8 September j.l. begonnen de regelmatige vergaderingen en werd een programma voor Oktober vastgelegd: 6.10.47, distra vespero; 13.10.47, Parolado (La Berna Kongreso); 20.10.47; Gramatika vespero; 27.10.47: Administracia vespero (Raporto pri la Ligkunsido 28.9.47).

Tevens kan medegedeeld worden dat een kosteloze Stadscurcus ingericht wordt in de Gemeenteschool, Eikenstraat 10 vanaf 1 Oktober af; de lessen worden gegeven door een onderwijzer en wel Dinsdag en Vrijdag van 19 tot 21 uur. Inschrijvingen en inlichtingen kunnen bekomen worden in de gemelde school op de lesuren nl. op 25, 26, 29 en 30 September e.k.

Een cursus wordt tevens gegeven in de Afdeling Talen van de Volkshoogeschool «Instituut Emile Van der Velde», Atheneum Franklin Rooseveltplaats; heropening 29.9.47. Inlichtingen en inschrijving vanaf 15 September e.k. Iederen Maandag, Woensdag en Vrijdag van 19 tot 21 uur.

V.E.B. Afdeling Mechelen: Een eerste vergadering, welke het nieuwe seizoen inluidt, greep plaats op 10.9.47 en werd gewijd aan de propaganda voor de Stadscurcus, het verslag over het Congres, de reis naar Zaandam en besprekingen in verband met de aanstaande Bondsvergadering van 28.9.47. Wat de stadscurcus betreft: hij grijpt plaats in de Gemeenteschool van de Louisastraat en nl. iederen Woensdag en Vrijdag van 18.30 tot 20 uur te beginnen met 15 October e.k. Hij duurt tot einde Maart en er wordt dan een examen afgenomen en een diploma afgeleverd aan de rechthebbende leerlingen. De inschrijvingen grijpen plaats in de school der Louisastraat op Woensdag 24.9., Vrijdag 26.9., op 7.10., telkens van 18.30 tot 20 u. Inschrijving en de lessen zelf zijn kosteloos. Inlichtingen kunnen steeds ingewonnen bij de lesgever Dr. T. Van Gindertaelen, Leopoldstr. 95 E. Mechelen.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMIO: Post la 26-a enigmo, la premio estis aljuĝita al f-ino D. Laporte el Blankenberge. Ŝi ricevis: «Romano pri Afrika Brino» de O Schreiner.

Ni sincere gratulas!

SOLVO DE LA 27-a ENIGMO.

Konduti. Impulso. Promesi. Kvalito. Afrankf. Stimuli. Komandi. Tranĉeo. Margeno. Lekanto. Pendolo. Rikolto. Likvidi. Alterni. Kliniko. Kadavro. Persiko. Bilardo. Klopodi. Silenti. Posteno. Kuniklo. Statuto. Rakonto. — Dum la mangado venas apetito.


N-ro 28: KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALE: 1. unuo de valoro ĉe konkursoj (R); prepozicio. — 2. sufikso (R); ĝi ornamas tekston (R). — 3. prefikso; konjunkcio; perioda gazeto (R). — 4. interjekcio; tre malutila herbaĉo (R). — 5. ejo por financaj spekulacioj (R); moviĝi en akvo (R). — 6. kupra oksido (R). — 7. Prepozicio; prepozicio; malkonfesi (R). — 8. konata nuntempa Esperanto-verkisto; vegetaĵo kun dika radiko (R). — 9. arbo (R); prepozicio; panigebla vegetaĵo (R). — 10. sento de malĝojo kontraŭ iu; kiu posedas ion kion oni mem malhavas (R); pronomo; likvaĵo tiritita el la sango (R). — 11. scienco pri la strukturo de la organismoj (R). — 12. enuiga afero (R); li laboras sub la surfaco de la tero (R).

VERTIKALE. 1. besto (R); ĝi flugas (R). — 2. agi laŭ ordono (R); ĝi

estas uzata por funkciigi motorojn (R). — 3. prepozicio; tempoparto (R); perforte eniri fremdan landon (R). — 4. mara fiŝeto en oleo (R); karakterizanta idonaskan beston. — 5. Korelativa vorto; pronomo; sufikso (R); io konkreta (R). — 6. grandegulo (R). — 7. al tiu nacieco apartenas la verkisto trovita sub 8 horizontale (R); ne multe. — 8. birdo (R); pronomo. — 9. la reĝa povo (R); senriĉego (R). — 10. kraniobori (R); frukto (R). — 11. admiranta ekstazo (R); pronomo. — 12. puntosimila (R); interkonsento pri monsumo, kiun la malpravanto devos pagi al la pravanto. (R).

La solvon oni sendu sur aparta folio al POSTBUS 342, BRUSSEL, antaŭ la 20-a de oktobro 1947.



V.E.B. Afdeling Brussel: Voor een voltallige vergadering bracht dhr E. Cortvriendt op Donderdag 18 September verslag uit over het Internationaal Esperanto-Kongres dat te Bern in Augustus ll. werd gehouden en waaraan een vijftigtal Vlaamse Esperantisten deelnamen.

Op Donderdag 2 Oktober a.s. te 20 U. in het lokaal Vlaamse Club 121, Em. Jacquainlaan, Brussel-Noord, onze eerste conversatieavond. Wie zich in het mondeling gebruik der internationale taal wil bekwamen bezoeke regelmatig onze clubavonden.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr. Enpresigo kostas minimume 15 bfr. Unu int. respondkuponon valorus 3 bfr.

PLENA VORTARO estas denove havebla! Jus aperis la tria eldono. Tut-tola bindo, 526 paĝoj. Prezo: 177 fr. Mendu ĉe via libro-servo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Rzeszów, Polen.

DEZIRAS KORESPONDI kun flandraj geesperantistoj pri Esperanto-movado, arbarkulturo, ŝako, literaturo, geografio, turismo kaj ĉiuj temoj: **NO-VOROL** Franciszek, ul. Syrokomli 4/m 3, Rzeszów, Polen.

Heroldo de Esperanto
Nova abonperiodo en Oktobro

HDE, la aktuala internacia organo de la E-movado, aperas en tag-jurnalata formato dufoje en la monate (somere, unufoje). Ĝi havas abonantojn kaj kunlaborantojn en 55 landoj.

HDE estas sendependa, sed ĝi batalas por samideana kunagado de ĉiuj E-istoj kaj mondlingvanoj, kaj por amika kunlaborado de ĉiuj nacioj en la mondo.

En septembro finiĝis la antaŭa abonperiodo (9-monata); la nova daŭras 15 monatojn (okt. 1947—jarfino 1948). La abonprezo estas proporcie la sama: 165 Fr. por 15 monatoj! Oni povas pagi en du partoj: tuj, 100 Fr., la reston (65 Fr.) ĝis 15.5.48!

Abonu ĉe: **F.E.I.**
P. Van Humbeekstr. 3
Brussel W. — (P.C.K. 3268.51)

ĈAPITRO 27-a
(Daŭrigo)

Doktoro Gulopez levis la manon, pentante silenton, kaj ekstaris.

« Mi demonstros al vi, kiel ĉio okazis », li kvietige ridetis, alirante la maldekstran lukopordeton, inter kiu estis premita streĉita ŝnureto, kiu pendis ekstere.

« Jen. Ekstreme de la ŝnureto, mi ligas ĉi tiun kontoran tondilon, kiu figuras la pistolon. Ĉe la alia ekstremo, ekster la ŝipo, mi kroĉis sufiĉe grandan pezon. Kiel vi konstatas, la lukopordeto ĉiam aŭtomate fermiĝas pro ia miskonstruo de la ĉarniroj; mi fiksas ĝin aperta per ĉi tiu ebena linilo. Nu, rigardu! »

Per la maldekstra mano, Doktoro Gulopez levis la tondilon malantaŭ la kapon, maltenis ĝin kaj falis antaŭen en la pozicion, kiun havis la kadavro. La tondilo, kiun la ŝnureto kuntrenis tra la lukopordo, survoje tuŝis la linilon, kiu falis teren. Malrapide la pordeto turne fermiĝis.

« Ĉu mi iam...! » miris la Profesoro. Doktoro Gulopez restariĝis kaj apertis la dekstran manon. Sur ĝia plato kuŝis la blua butono.

« Jam antaŭ sia memmortigo Maxton gluis en manon ĉi tiun butonon, kiun li ŝtelis el la kajuto de Dubois. Maxton mem ŝmiris sangon sur ĝin kaj ankaŭ sangomakulojn sur la pordofoston. Ĉu lia tibiosto ne estis iom vundita? »

« Sed kial la butono? » demandis la Kapitano.

Kant sidis malantaŭen en sia fotelo. Li facile sekvis la fabelan rivelon de la ŝakmajstro kaj jam divenis la pluaĵn klarigojn.

« Kial la butono? » Gulopez ridetis. « Ĝi estis la majstropuŝo de la plano. Ĉu oni ne devis senprokraste pridemandi Dubois por ke li deklaru: « mi nepre konas la murdanton? » Tiel liberiĝis la vojo al la dua krimo, la murdo je Dubois mem. Estas Maxton, kiu venenis la neŭralgian pulvoron kaj la apotekan botleton, kiun li mem sendube kaŝis en la kofro de Steinman. La cetero glate fluis. Li sciis ke pli-malpli f-ue oni suspektos Steinmann. Por tio li lasis la kompromitan aktaron en la sefo. Mi ripetis: ĝi estis demona vengoplano. »

« Sed se Steinmann senkulpis, kial do li memmortiĝis sin? » demandis la Kapitano.

« Sole ĉar li komplete ruinigis. Oni akceptos, kion la Inspektoro jam rimarkigis, ke eĉ Maxton ne sciis kiel kaduka estis la financa pozicio de SSteinmann. Ĉiukaze la forpaso de Maxton ne nur neniigis lastan savoŝancon, sed krome tiu abrupta morto ankoraŭ akcelis, pro natura borsa reago, la fundigon. Cetere, jen la telegramo, kiun la industriisto ricevis ĝuste antaŭ sia morto. Sinjorino Steinmann donis ĝin al mi. « Situacio senelira — stop — Iscos 98 — stop — fundiĝo neevitebla — Hodgers. »

JAĤTO VETURAS EL...

« KRIMINALA ROMANO »

Verkis: Deck Dorval
Tradukis: Dro T. Ken.

Koncerne la veneniĝon de Dubois, ĉio indikas ke ĝi estis antaŭpripensita. Efektive, la seruro de la pordo de Dubois difektiĝis duon da tagoj antaŭ la murdo. Mi ekzamenis ĝin kaj trovis en ĝi najleton. Sendube faro de Maxton. Li deziris ebligi ĉiumomentan eniron en la ĉambro por forpreni la butonon kaj interŝangi la pulvorajojn. Mi eĉ aŭdacus aserti ke Maxton konis la restadon de Dubois ĉe fraŭlino Sterlen. Mi ne kapablas pruvi tion, sed ni ne forgesu ke Maxton informis sin pri la fikonduto de Alex Steinmann, kio provokis la rompon de la gefianĉiĝo.

Inspektoro Kant stopis sian pipon. « Vi eble pravas, Doktoro, ĉio estas eĉ probable », li rekonis, « sed kiun pruvon vi disponas por defendi teorion tiel fa-

belan antaŭ tribunalo? »
« Maxton faris unu eraron, eraron cetero malfacile antaŭvideblan. »
« Kaj ĝi estis? »
« Mi prefere deklarus ĝin al vi sola, Inspektoro. »
« Ĉu necese, Doktoro? » La serioza vizaĝo de Gulopez montris al Kant, ke la ŝakmajstro vere prisilentis ion gravan.
« Necese pro vi », flustris tiu ĉi en oreton de Kant, kiu ekkomprenis la takton de la juna hispano.
« Se mi mallertis, Doktoro, nu, tiam ĉiuj ĉeestantoj konstatu mian malvenkon! »
La ŝakmajstro prenis la flavan kuglingeton de sur la skribotablo.
« Bone. Jen la ŝlosilo de la tuta sekreto. Ĉu vi ankoraŭ memoras, Inspektoro,

Notoj pri kelkaj vortoj, lokonomoj k. s.

- Adheri
- A propos
- Beginstrato
- Blackpool
- Bouches-du-Rhône
- Browningo
- Buenos Aires
- Calvi
- C'est pour toujours
- Crédit Lyonnais
- delirium tremens
- fraŭdi
- girl
- Hunter
- Ile-Rousse
- Iron and Steel Corporation
- Kloralo
- Koncedi
- konfronti
- Korona
- La belle Stella
- markonisto
- markonigramo
- Marseille
- New York
- Nice
- Nihil
- Riviera
- sefo
- spuro
- The Ibero-American Private Investigation Bureau
- Yale
- vertigo

- alteniĝi, esti alĝuita al.
- franca esprimo: antaŭ ol mi forgesas, diru... la Antverpena malliberejo situas en ĝi.
- angla banurbeto.
- franca departemento.
- aŭtomata pistolo kun ŝargujo en la kolbo (laŭ la fabrikanto: Browning).
- argentina ĉefurbo.
- korsika marhaveneto.
- el la franca: estas por ĉiam.
- bankonomo: Lyon-a Kredito.
- el la latina: ebrulia frenezo, fuzioza frenezo.
- trompŝteli misuzante konfidon.
- el la angla: knabino.
- poŝhorlogo, laŭ la angla nomo: Hunting Watch.
- korsika urbeto.
- el la angla: Fero- kaj Ŝtalo-Korporacio.
- komponaĵo de kloro kaj alkoholo.
- koncesii, ne kontraŭi.
- kompari, kontraŭmeti du atestojn, akuzitojn.
- Marko de bonega cigaro.
- el la franca: La bela Stella.
- telegrafisto per sendrata telegrafo (laŭ la itala inventinto: Marconi).
- sciigo sendata per sendrata telegrafo.
- franca havenurbo.
- usona urbego.
- banurbo en la Riviera.
- el la latina: nenio(m).
- marborda regiono en Suda Francujo kaj Norda Italujo.
- laŭ la angla: brulrezista, kirasita mon-kaj perŝranketo.
- postsigno.
- el la angla: La Hispana-Amerika Privata Esp-lorkontoro.
- sekuriga seruro (laŭ la inventinto: Yale)
- kapturniĝi; vertigi: havi kapturniĝon.

ke kiam, en la antaŭhierraŭa nokto, vi apertis la pordon, ni aŭdis ruliĝi ĉi tiun ingon for? Vi atentigis min pri ĝi, petante ke mi serĉu ĝin. Ni neglektis tion kaj, sen la aludo, kiun vi faris finante vian disvolvon, la penso estus neniam veninta en mian kapon. Tamen ĝi estis la ŝlosilo de la tuta sekreto. Ĉe la pafo la kuglingo, pro malofta hazardo, ruliĝis kontraŭ la pordon. Do, post la pafo, tute maleblis ke iu forlasis la ĉambron.»

Kant tuj divenis, sed tamen lasis Doktoron Gulopez finparoli.

« Damne! Evidente... mi ne komprenas kiel mi ne pensis pri tio! » Plenmane li frapis sian frunton.

La Kapitano rektiĝis.
« Doktoro Gulopez, vi elegante solvis tion... Granda Neptuno... Mi gratulas! »
La ŝakmajstro iomete rugiĝis.

« Ne, vi eraras. Ne min vi gratulu. Inspektoro Kant klarigis ja ĉion. Mi simple arigis la trovitajn erojn. Lin vi honoru! »

« Gratuli min! » Kant ridis, « mi kaptiĝis kiel komencanto. Mi vere inklinas demandi al nia brava Higgs ĉu li ne bezonas asocianon en sia kokinbredejo. »
Li kore skuis manon de Gulopez. « Vi brile, sublime solvis ĉion, Doktoro Gulopez. » Kant montriĝis lojala perdanto. Tiam li time turnis sin al Yvonne. Post la konkludo de Gulopez, li ne plu kuraĝis rigardi ŝin.

« Kaj vi, fraŭlino Durlet, kion opinias vi? Ĉu mi ne brile stumblis de mia piedestalo? »

« Inspektoro », ŝi kantis al li, akcentante la vorton, « Inspektoro, mi plene konfirmas la opinion de Doktoro Gulopez pri vi. » Ŝi ekstaris, metis manon sur larĝan ŝultron de Kant kaj icone ridis: « Krome, mi notas cirkonstantojn malplikulpigajn... Viaj pensoj eble vagis tro al la ŝakluda sinjorino. Ĉu ne, Xaverius? »

Nun Profesoro De Groot ja devis purigi la vitrojn de sia nazumo, dum li ridetante skuis la grizan kapon. La vizaĝo de Kapitano Joost fariĝis komika. Li verdire ne estus pli mirinta se lia granda Neptuno estus persone aperinta antaŭ li.

« Venu », Kant diris al la knabino, « tie ĉi estas tro da publiko! »

En la koridoro ili, brakon sub brako, renkontis Stella Sterlen, pli koketan ol iam.

« Fraŭlino Sterlen », Kant afekte mistere eligis, « mi longe serĉis la sinjorinon, kiun vi hieraŭvespere aludis, sed ja fine mi malkovris ŝin! »

FINO.

Veranto, uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.